

## *Ĝusta Kredo*

### *La 4-a Ĉapitro de Saddharma-Pundarika Sutro*

#### 法華經信解品第四

tradukis **Asano Sanĉi**, Japanio

Tiam kvar kleraj disĉiploj, t.e. Subhuti, Mahakaĉajana, Mahakaŝjapa kaj Mahamaŭndgalajana, estis kortuŝitaj pro la senekzempla Darmono, kiun ili ĵus aŭdis de la Budho kaj pro tio, ke la Budho promesis al Ŝariputro Anuttara-Samjak-Sambodhion. Ili ĝojegis, dancis, stariĝis kaj ordigis sian portatan veston. Poste ili malkovris dekstran ŝultron<sup>1</sup>, elmetis sian dekstran genuon al la tero, humile kumpremis siajn manojn kliniĝinte adoris la Budhon kaj suprerrigardante Lian vizaĝon diris al la Budho:

“Ni okupas ĉefan situacion inter la bikŝuoj kaj tre maljuniĝis. Sed ĉar ni estis kontentaj pro tio, ke ni jam akiris Nirvanon, ni ne plue deziris Anuttara-Samjak-Sambodhion. Jam multe da jaroj pasis de la tempo, kiam la Budho efektive predikis la Darmon. Laciĝinte kaj neglektinte eĉ en la kunsido por la Darmono ni pripensis nur pri vakeco, neformeco kaj nefareco<sup>2</sup> kaj ne ĝojis pri tio, ke Bodhisatvoj kutime ludas je okulto de la Darmono, purigas la landon de Budho kaj atingigas ĉiujn estaĵojn al Anuttara-Samjak-Sambodhio. Ĉar ni jam eliris el la tri mondoj kaj estas akirinta nirvanon dank’ al la favoro de la Budho, spite al maljuniĝo ni neniam ĝojis eĉ momente je la Anuttara-Samjak-Sambodio, kiun la Budho predikis por bodhisatvoj. Sed nun mi ĝojegis senekzemple antaŭ la Budho aŭdinte tion, ke Li promesis al bikŝuo Anuttara-Samjak-Sambodhion. Ĝis nun ni neniam atendis ke ni iam aŭdos tian maloftan Darmon. Mi profunde ĝojas pro tio, ke ni akiris grandan bonegan profiton kaj ne esperinte ni akiris nekalkuleblajn maloftajn trezorojn.

Budho! Nun ni klarigas la signifon de la superdirito per parabolo. Ekzemple estas homo, kiu jam frue forkuris el sia patra domo. Li longe loĝadis en alia lando de la aĝo de dek jaroj ĝis kvindek jaroj. Li ju pli maljuniĝis des pli mizeriĝis kaj petadis almozon irante kvar direktojn. Lia patro, kiu estis loĝanta en granda domo, ne havis sian propran filon escepte la forkurinta filo, kvankam li posedis nekalkuleblajn trezorojn. En la trezorejo estis oro, arĝento, lazurŝtono, koralo, sukceso kaj vitro. Li havis multajn servistojn kaj

---

<sup>1</sup> malkovris dekstran ŝultron, etiketo en malnova Hindujo.

<sup>2</sup> Vakeco, neformeco kaj nefareco, 空,無相, 無作. Estas tri samadioj, meditadoj: unue oni pripensas ke ĉiuj estaĵoj estas vakecaj kaj ne-memecaj; due pripensas ke Nirvano estas desiĝita de ĉiuj formoj, t.e. koloro aŭ voĉo ktp.; trie pripensas ke nenio estas dezirebla en la mondo.

oficistojn. Li ankaŭ havis nekalkuleblajn elefantojn, ĉevalojn, bovojn, ŝafojn, kaj veturilojn. Lia ekonomia rilato etendiĝis al alilandoj, kaj ĉie estis multaj komercistoj aŭ klientoj.

Tiam lia mizera filo pasinte tra multaj vilaĝoj kaj landoj alvenis al la urbo, kie lia patro loĝas. La patro ĉiam amis sian filon. Sed li neniam parolis pri sia filo pli ol kvindek jarojn, de kiam li dividiĝis el sia filo. Li ĉiam pentis dirante, 'Kvankam mi havas multajn trezorojn, mi jam maljuniĝis. Spite al tio, ke mi havas multe da oro, arĝento kaj malofta trezoro, bedaŭrinde mi ne havas mian propran filon. Se mi iam mortos, miaj ĉiuj havaĵoj malaperos el mi, ĉar neniu heredonto estas al mi.' Li ĉiam enpensiĝis en sia forkurinta filo. Li ankaŭ supozis, 'Kiel mi kontentus, se mi povus nur revidi mian forkurintan filon? Tiam tuj mi transdonos mian tutan riĉaĵon al li.'

Budho! Tiam la mizera filo hazarde revenis al la domo de sia patro laborante de loko al loko. Starante apud la pordo li vidis en granda distanco iun homon, kiu sidas sur leona sidejo metante siajn ambaŭ piedojn sur trezora tableto. Multaj brahmanoj, kŝatrioj kaj laikuloj estis ĉirkaŭantaj tiun ĉi homon ornamitan de altkostaj ĉenoj el perloj. Oficistoj kaj servantoj, kiuj estas dekstre kaj maldekstre de li kun blankaj fucoj<sup>3</sup> en siaj manoj, kovras trezorajn kurtenojn sur li, pendigas florajn flagojn, verŝas parfumon sur la tero, faligas multe da belaj floraj kaj enprenas aŭ deprenas trezorojn. Pro tiaj diversaj ornamaĵoj la digno de ĉi tiu homo ŝajnas pli majeste. Ĉi tiu homo estis vera patro de la mizera filo. Sed la filo ne povis scii ĉi tion, ĉar la homo ŝajnis al li tro nobla. Krom tio li timegis pro la grandiozeco de la homo kaj pentis tion, ke li alvenis hazarde ĉi tien. Li pensis, 'Ĉu ĉi tiu homo estas reĝo aŭ samulo al reĝo? Eble la homo ne estas tiu, kiu dungos min kaj donos al mi monon kiel laborpagon. Estas pli bone ke mi iru al kvartalo de malriĉuloj, kie mi povos libere akiri vestojn aŭ manĝaĵojn. Se mi estas ĉi tie longe, ili kaptos min kaj laborigos min perforte. Pensinte tion li rapide forkuris el la loko.

Tiam el la leona sidejo la riĉulo vidis sian propran filon kaj ĝojegis. Li pensis, 'Nun mi fine povas doni al mia filo mian tutan riĉaĵon kaj trezorejon. Kvankam mi longe deziris vidi mian filon, sed mi ne povis vidi lin. Li subite alvenis ĉi tien. Finfine mia deziro estos plenumata. Kvankam mi estas maljuna, mi ankoraŭ amegas mian filon.' Li ordonis al sia servanto iri kaj reveni kun li. Tiam la sendito tuj kuris kaj kaptis la mizeran filon. Ĉi tiu tre surpriziĝis kaj kriis laute, 'Mi ne kulpis. Pro kio vi kaptas min?' La sendito kaptis lin pli forte kaj revenis al la domo de la riĉulo kun li.

Tiam la mizera filo pensis, 'Mi ne kulpis, dume ili kaptis min. Certe ili mortigos min.' Timeginte li falis teren kun ĝemego. La patro vidis lin tre malproksime kaj diris al sia sendito, 'Mi ne bezonas ĉi tiun. Ne kaptu lin perforte! Verŝu malvarman akvon sur lian vizaĝon kaj veku lin. Sed neniu parolu kun li.' Ĉar la patro komprenis, ke la filo estas sklavema kaj sindetema pro lia grandiozeco, li ne diris, 'Ĉi tiu estas mia filo.', kvankam li bone sciis ke ĉi tiu estas lia vera filo. La sendito diris al la filo, 'Mi pardonas vin. Iru kiel plaĉas al vi.' La mizera filo ĝojegis. Stariĝinte li iris al kvartalo de malriĉuloj por almozpeti veston kaj manĝaĵon.

Tiam la riĉulo sendis al sia filo por gvidi lin per alia rimedo du senditojn, kiuj estas malgrasiĝintaj kaj mizeraj. Antaŭ ekiro la riĉulo diris al ili, 'Iru al la mizerulo kaj diru al li, "Jen estas por vi bona posteno. Eble oni donos al vi duoblan salajron." Se li konsentas, revenu kune kun li kaj laborigu lin en mia domo. Se li demandas, "Kian laboron oni donos

---

<sup>3</sup> fuco, 扠子. ilo uzata por dispeli moskitojn aŭ muŝojn, kiu estas farita el haroj de iu besto.

al mi?”, diru al li, “Oni volas dungu vin por forigi ekskrementon. Ni ankaŭ laboros kun vi.” Irante al la kvartalo la sendito trovis la mizerulon kaj parolis detale superdiritajn aferojn. Reveninte al la domo de riĉulo la filo ricevis promesitan salajron kaj forigis ekskrementon. Tiam la riĉulo vidinte la mizeran figuron de sia filo kaj tre kompatis lin. Post kelkaj tagoj la patro vidis la filon laciĝintan, kadukiĝintan kaj malpurigitan el la fenestro de sia domo. Ĉe tio la riĉulo depreninte sian molan jakon kun belaj ĉenoj kaj diversajn ornamaĵojn prenis malbonan kaj malpuregan veston. Li intence malpurigis sian korpon kaj prenis vazon por porti ekskrementon. Li prizorgis tiel atente, kiel sia filo neniam timas lin. Li diris al siaj dungitoj, ‘Vi laboru diligente! Neniam neglektu.’ Finfine li proksimiĝis al sia filo per sia lerta rimedo. Poste li diris al sia filo, ‘Ho ve amiko! Vi ĉiam laboru ĉi tie. Neniam iru alien! Mi multigos vian salajlon. Plue mi donos al vi diversajn vazojn, rizon, vermiĉelon, selon, vinagron k.t.p. Ne suspektu! Ne estu timeca! Jen estas maljuna bonkora servisto. Se vi bezonus, mi donus lin al vi. Trankviliĝu, ĉar mi zorgos pri vi kvazaŭ mi estus via patro. Ne estu malĝoja! Mi estas jam grandaĝa, sed vi estas ankoraŭ juna. Ŝajnas al mi ke vi havas en via koro nek trompon, nek neglekton, nek koleron, nek malamon. Vi neniam eldiras vorton el venĝemo. Mi ne vidas en vi malbonon, kiun kutime havas miaj aliaj dungitoj. De nun mi traktos vin kiel mia vera filo.” Baldaŭ la riĉulo donis nomon al la mizerulo kaj faris lin sia filo.

Tiam kvankam la mizerulo ĝojegis tiun ĉi trakton de la riĉulo, ankoraŭ li pensis sin mem nur malnoblulo dungita. Tial la riĉulo ĉiam laborigis lin nur por forigi ekskrementon dum dudek jaroj. De la tempo ili fidis profunde unu la alian kaj la mizerulo libere eniris aŭ eliris la domon de la riĉulo. Sed ili ankoraŭ aparte loĝis en siaj propraj domoj.

Budho, la riĉulo finfine malsaniĝis kaj sentis, ke post nelonge li certe mortos. Tiam li diris al la mizerulo, ‘Mi havas multe da oro, arĝento kaj aliaj trezoroj, kiuj estas superplenaj je miaj trezorejoj. Vi ekzameni ĉiujn trezorojn por vi. Nun mi diras al vi tuton malkaŝite. Bone komprenu mian diraĵon. Mi kaj vi estas neniam malsamaj. Gardu vin! Ne ellasu kaj ne perdu ĉion!’

Tiam la mizerulo aŭdinte la parolon de la riĉulo ekzamenis ĉiujn oron, arĝenton kaj aliajn trezorojn en la trezorejo. Sed li ne volis treni eĉ plenmanon da trezoroj. Li ankoraŭ loĝadis en antaŭa domo, ĉar li re povis forigi sian humilan koron. La riĉulo ordonis al la filo, ke li kunvoku ĉiujn parencojn, la reĝon, vasalon, kŝatriojn kaj upasakojn. Kiam ĉi tiuj kolektiĝis, tiam li deklaris, ‘Gesinjoroj, ĉi tiu estas mia filo, kiun mia forpasinta edzino naskis. Li forkuris el iu kastelo de mi. Dum pli ol kvindek jaroj li vagadis kaj sufersdis sola. Lia antaŭa nomo estas tiu. Mia nomo estas tiu. Antaŭe ni malĝoje serĉadis lin tie kaj ĉi tie. Mi hazarde renkontis lin. Tiu ĉi estas vere mia filo. Vere mi estas lia patro. Ĉiuj riĉaĵoj, kiujn ni posedadis, de nun estas posedotaj de ĉi tiu filo. Li ankaŭ scias miajn specialajn riĉaĵojn.’

Budho, Bhavagato, tiam la mizerulo aŭdinte la paroladon de sia patro ĝojegis senekzemple kaj pensis, ‘Mi antaŭe deziris nenion al tiu ĉi riĉulo. Tamen tiu ĉi trezorejo estis donacita al mi.

Nu, Budho, la riĉulo estas Tathagato. Ni ĉiuj estas simile al la filoj de la Budho. Ĉar Tathagato ĉiam predikis, 'Ĉiuj estaĵoj estas miaj filoj.' Pro tri suferoj<sup>4</sup> ni ricevas tre varmegajn ĉagrenojn en naskiĝo kaj morto. Pro niaj iluzioj kaj sencioj ni ĝis nun estis sinfordonintaj al malgranda Darmo. Hodiaŭ la Budho instruas nin, ke ni pripensu kaj forigu la ekskrementon, t.e. bagatelan diskuton pri Darmo. En la laboro ni klopodinte tre multe akiris iom da prezo, t.e. Nirvano. Akirinte tiun ĉi ni ĝojegis, kontentiĝis kaj diris, 'Ni akiris multe da profito, ĉar ni klopodis en la Budha Darmo. Sed antaŭe sciinte ke nia koro estis alligita al bagatelaj aĵoj kaj deziris nur malgrandon Darmon, la Budho lasis nin kiel ni estas kaj ne instruis ke por ni ekzistas vera scio kaj trezorejo. Kiam la Budho predikis pri la scio de Budho per lerta rimedo, tiam ni aŭdis la predikon, sed ne deziras mahajanan Darmon, ĉar ni akiris iom da prezo, t.e. Nirvano kaj kontentiĝis. Tathagato iam parolis por ĉiuj bodhistvoj per Budha scio, ni deziris nenion je tiu ĉi Darmo. Ĉar komence la Budho sciis ke ni deziras nur malgrandan Darmon. Li predikis laŭ nia plaĉo per sia lerta rimedo. Malgraŭ tio ni ne sciis ke ni estas veraj Budhaj filoj. Ĝus nun ni sciis, ke la Budho predikis senavarece ĉion, kion Li sciis. Kvankam de pasinta tempo ni estis Budhaj filoj, ni deziris nur malgrandan Darmon. Se ni dezirus Mahajanan Darmon, la Budho eble predikis ankaŭ por ni Mahajanon. Nun la Budho predikas nur Ekajanon en tiu ĉi sutro. Kvankam iam la Budho riproĉis antaŭ bodisatvoj tiujn, kiuj deziras malgrandan Darmon, tamen la Budho instruis fakte nin per Mahajana Darmo. Tial ni diras, 'Kvankam antaŭe ni neniam deziris Mahajanon, granda trezoro de la Darma Reĝo nun alvenis al nin nature. Ni jam akiris ĉion, kion Budhaj filoj devas akiri.'"

Tiam Mahakaŝjapo diris per versaĵoj por klarigi denove ĉi tiun signifon.

- 1) Ho ve, hodiaŭ aŭdinte predikadon de la Budho,  
Kontentiĝas kaj ekdancas senekzemple ni ĉiuj.
- 2) Laŭte deklaras la Budho, 'Ŝravako fariĝos la Budho,'  
Ne serĉante ni akiras la plej superan trezoron.
- 3) Knabo malgranda kaj senscia kuris el la patra domo,  
Iradis tra la vilaĝoj en la lando malproksima.
- 4) Pasis ĉirkaŭ kvindek jaroj kaj lia patro serĉadis  
sian filon forkurintan konstante en kvar direktoj.
- 5) Laciĝis fine la patro pro sia longa serĉado,  
Konstruis belan domogon kaj ĉiam amuziĝadis.
- 6) Li estas granda riĉulo havanta multe da oro,  
Arĝento, tridakno, perlo, agano kaj lazurŝtono.
- 7) Elefanto, ĉevalo, bovo, ŝafo, palakeno,  
veturilo kaj servisto, li ja posedis tre multe.
- 8) Liaj financaj rilatoj etendiĝis alilanden.

---

<sup>4</sup> tri suferoj, 三苦. tri specoj de suferoj;

a. la sufero pro sufero, kiu havas lokon okaze de la tempo, kiam iu sentas doloron en sia koro, t.e. varmega aŭ malvarmega ktp.

b. la sufero pro detruo, kiu havas lokon okaze de la tempo kiam io detruigas.

c. la sufero pro agado, kiu havas lokon okaze de la tempo kiam iu sentas "ĉiuj estaĵoj estas ne konstantaj."

- Ĉiam multon da klientoj li havis tie kaj ĉi tie.
- 9) Ekstreme multe da homoj venis kaj adoradis lin.  
Li estis treege amata konstante eĉ de la reĝo.
  - 10) Potencaj familioj kaj ankaŭ multaj vasaloj  
Tagon post tago alvenis kaj adoris lin elkore.
  - 11) Li estis granda riĉulo kaj posedis potencegon.  
Sed ju pli maljuniĝas, des pli li maltrankviliĝas.
  - 12) Tage kaj tage li pensas, 'Ho, morto tre proksimiĝas.  
Tute kvindek jaroj pasis de kiam la filo forkris  
Kiel mi povas nun disponi miajn multajn riĉaĵojn?'
  - 13) La mizerulo vagadas por akiri necesajojn,  
De vilaĝo al vilaĝo, kaj de lando al lando.
  - 14) Li laĉiĝis pro malsato kaj ĉagrenis pro ŝvelaĵo.  
Iam li povis akiri, sed alie nenion.
  - 15) Vojaĝante li alvenas al la patra kastelo.  
Finfine la filo atingas la domegon de la patro.
  - 16) Nun la filo vidas ĉi tie grandiozecon  
En la loko ĉirkaŭita de trezora kurteno.
  - 17) Tiam lia patro sidas sur la leona sidejo  
Kun tutaj familianoj, parencoj kaj servistinoj.
  - 18) Iuj kalkulas trezorojn, oron, arĝenton kaj alian.  
Aliaj ĉiam ekzamenas elspezon aŭ enspezon.
  - 19) Nu, vidinte ĉi tion la mizerulo suspektas.  
'Ĉu tiu ĉi estas la reĝo aŭ similulo al la reĝo?'
  - 20) Li ekpensas sekrete, 'Se mi pli longe restadus,  
Nepre li premegus min kaj devigus labori.'
  - 21) Ĉe tio la filo forkuris el la domo de riĉulo.  
Por gajni laboron li venis kvartalon de malriĉulo.
  - 22) Tiam la riĉulo vidis sian filon malproksime  
El la leona sidejo kaj sciis la tutan aferon.
  - 23) Do, la riĉulo ordonis senditon malpacience,  
'Postkuru la mizerulon kaj revenu kune kun li.'  
La filo surpuriziĝis, turmentiĝis kaj falis teren.
  - 24) 'Ĉi tiu homo kaptos min, certe tuj li mortigos min,  
Kial li alvenis al mi kun manĝaĵo kaj vesto?'
  - 25) La riĉulo sciis tion ke li estas malsaĝega  
Kaj neniam fidas lin, kiu estas vera patro.
  - 26) Ĉe tio per lerta rimedo li sendis alian senditon,  
Kiu estas unuokula, malbela kaj malgracia.
  - 27) 'Diru al la mizerulo, "Iu volas dungi vin  
Por forigi ekskrementon kaj doni duoblan salajron."'
  - 28) Tiam aŭdinte ĉi tion la mizerulo ĝojegis,  
Alvenis kun la sendito kaj laboris laŭ la ordono.
  - 29) Tra la fenestro la riĉulo ĉiam vidis sian filon,  
Kiu estas tre malsaĝa kaj laboras malnoblece.

- 30) Laŭ bona gvidado la riĉulo surmetis veston makulitan.  
Alportante la vazegon por forigi ekskrementon  
Proksimiĝis al sia filo, kunparolis kaj vigligis
- 31) 'Jam mi pliigis sarajron kaj donos oleon<sup>5</sup> por ŝmiri piedojn  
kaj multajn manĝaĵojn kaj varman kusenon.
- 32) Iufoje li admonis, 'Vi laboru diligente!' aŭ  
Alie li ĝentile diris, 'Mi taksos vin kiel mia filo.'
- 33) Pro lia bona gvidado la filo libere eniras en la [ĉi tie mankas vortoj?]  
Post dudek jaroj li fariĝis mastrumanto.
- 34) 35) Kvankam la riĉulo montris al la filo en- kaj elspezadon,  
De siaj oro, arĝento, perlo, vitro kaj aliaj,  
La filo ankoraŭ loĝadis ekstere de la pordego  
Pripensante en kabano, 'Mi ĉiam havas nenion.'
- 36) Sciante ke lia filo fine fariĝis grandeca  
La riĉulo volis doni al la filo siajn ĉiujn posedaĵojn,  
Kaj kolektis siajn parencojn, reĝon, vasalojn, kŝatriojn.
- 37) Li deklaras en amaso, 'Ĉi tiu estas mia filo.  
Kvindek jaroj pasis de la tempo, kiam li forkuris.
- 38) Dudek jaroj pasis de l' tempo, kiam mi renkontis lin.  
Iam mi perdis la filon en iu granda kastelo.  
Mi longe serĉadis ĉi tiun kaj fine li venis ĉi tien.
- 39) Mi volas transdoni al li la domegon kaj servistojn;  
Kiujn mi nun posedas, li posedu tiujn laŭplaĉe.
- 40) La filo pensis, 'Antaŭe mi ja estis tre malriĉa.
- 41) Nun mi ricevis trezorojn el mia amata patro,  
Domon kaj ĉiujn riĉaĵojn, mi ĝojegas senekzemple.'
- 42) Budho ankaŭ amegas nin same kiel la riĉulo.  
Sciinte ke ni deziras nur malgrandan veturilon,  
Li neniam predikis ke ni iam fariĝos Budhoj.
- 43) La Budho predikis, 'Eĉ se vi gajnus seniluzion,  
Vi estus nur ŝravako liberiĝinta laŭ hinajano.'
- 44) La Budho predikis al mi, 'Jen estas la plej supera vojo.  
Tiu, kiu studas la vojon, certe iam enlumiĝos.'
- 45) Pro ordono de la Budho mi predikas veran vojon.  
Por mahasatvoj per kaŭzoj, paraboloj kaj esprimo.
- 46) Knaboj de la Budho aŭdas Darmon, kiun mi predikas,  
Pripensas pri la Darmono, klopodas tage kaj nokte.
- 47) Fakte por bodhisatvoj la Budho predikas veron,  
Sed Li ne predikis al ni la esencon da Darmono.
- 49) Kvankam la mizera filo proksimiĝis al sia patro,  
50) Kaj vidis patran riĉaĵon, li ne povis ricevi ĝin.  
Eĉ se la Budho predikus trezoron de Budho Darmono,

---

<sup>5</sup> ŝmiris oleon sur piedo, en Hindujo laboristo kutime havas haŭtfendetojn sur siaj piedoj.  
Sekve oni kuracas ŝmirinte oleon sur la piedoj.

- Ni neniam havis aspiron por la plej supera vojo.
- 51) Ni estis kontentaj ĝis nun je interna estingiĝo<sup>6</sup>  
Havante rilaton ĉiam nur al ĉi tiu afero.  
Ni neniam pripensis pri la plej supera vojo.
- 52) Eĉ se ni aŭdus purigi landojn de ĉiu budho  
Kaj instrui estaĵojn, ni ne havus intereson.
- 52) 53) Estaĵoj estas vakecaj, ankaŭ estas sennaskiĝaj, faraj,  
Senestingiĝaj, sengrandaj, senmalgrandaj kaj senfaraj,  
Ankaŭ senilumizecaj.  
Ĉiam tiel pripensante ni nek gojis nek deziris  
Por la plej supera vojo.
- 55) Por longlonga tempo ni ne vidis nek aspiris la veron.  
Krome ni pensis ke nia Darmono estas plej supera.
- 56) Ni longlonge klopodis ĉiam laŭ Vakeca Darmono.  
Forigis ĉiujn ĉagrenojn de sufero en tri mondoj  
Kaj en lasta korpo loĝadas en fenomenaj Nirvano.
- 57) Ni pensas, se ni atingus nian celitan lokon,  
Tute ni povus repagi al la favoro de Budho.
- 58) Kvankam ni iam predikis al la knaboj de la Budho  
La Darmon de bodhisatvo kaj instigis al la vera vojo,  
Sed ni mem neniam volis akiri ĉi tiun Darmon.
- 59) Nu, la Budho forlasis nin je la Darmono de Mahajano,  
Ĉar Li bonege komprenis nian malsaĝan koron.  
Kvankam la Budho nin kosolis Mahajanon,  
Sed li neniam predikis pri la gajno de vera profito,
- 60) La riĉulo sciinte, ke la filo estas neregebla,  
Moderigis lian koron per sia lerta rimedo.  
Kaj finfine li donacis al li siajn ĉiujn riĉaĵojn.
- 61) 62) La Budho ankaŭ aperigis tiel maloftan aferon.  
Sciinte, ke ni deziras nur malgrandan veturilon,  
Li ordigis nian koron per sia lerta rimedo  
Kaj finfine li donacis al ni siajn ĉiujn riĉaĵojn.
- 63) Mi nun akiris trezoron ne deziritan antaŭe  
Ĝuste kiel la mizerulo akiris multajn trezorojn.
- 64) Budho, hodiaŭ ni gajnis vojon<sup>7</sup>, rezulton<sup>8</sup>, okulon,  
kiu estas tute pura en Seniluzieca Darmono<sup>9</sup>.
- 65) Longatempe ni obeis je la ordonoj de la Budho  
Kaj hodiaŭ akiris ni unuan fojon la frukton.
- 66) Longlonge ni klopodadis je la Brahmaĉaro pura

---

<sup>6</sup> interna estingiĝo, estingiĝo de pasioj.

<sup>7</sup> vojo, pripensado pri tio ke ĉiuj pasioj originale nek naskiĝas nek estingiĝas.

<sup>8</sup> rezulto, la vera stato de ĉiuj Darmono.

<sup>9</sup> Seniluzieca Darmono, 無漏の法. la Scio per kiu iu povas vidi la leĝon de la vera stato.

- En la Darmo de la Reĝo Darma kaj nun akiris rezulton,  
Kiu estas plej supera kaj granda seniluzieco.
- 67) Ĉar ni estas vere Ŝravakoj<sup>10</sup>, hodiaŭ ni volas prediki  
Al la vivaĵoj en la mondo la voĉon de Budha vojo.
- 68) Ĉar ni estas vere arhatoj, ni devas esti adorataj  
Inter ĉiuj ĉielulo, homo, demono kaj brahmano.
- 69) Ĉar la Budho estas al ni granda favorulo tute  
Per maloftaj aferoj li instruas kaj favoras nin.
- 70) Ja neniu el ni povus rekompenci nian Budhon,  
Eĉ se ni ĉiuj penegus dum nekalkuleblaj kalpoj  
Kaj donacus al la Budho per ĉiuj niaj posedaĵoj.
- 71) - 74) Ja neniu el ni povus repagi al nia Budho,  
Eĉ se adorus kore al Budho dum la kalpoj  
Kiel sabloj de la Ganga portante lin sur la dorso  
Kaj ankaŭ regalus lin dum kalpoj da Gangaj sabloj  
Per tre bela kaj bonega aranĝo de manĝotablo,  
Nekalkuleblaj vestoj teksitaj de la trezoroj,  
Belegaj iloj por dormo, diversaj medikamentoj,  
La pagodoj ornamitaj de la goŝirŝa ĉandano<sup>11</sup>  
Kaj tre maloftaj trezoroj, trezoraj vestoj sternitaj sur la tero belege.
- 75) - 77) Budhoj posedas maloftajn nekalkuleblajn, senlimajn,  
Mirindajn okultapovojn kaj toleras tiujn aferojn  
Por la malestimatuloj kiel la Reĝo de Darmoj,  
Kiu estas nefara kaj seniluzieca.  
Ili predikas laŭvole al ĉiuj ordinaraj homoj,  
Kiu forte alteniĝas al la bagatelaj aĵoj,  
Ili predikas la Darmon per paraboloj laŭ la grado.
- 79) Laŭ la karmo de vivaĵoj en estinta vivado  
Budhoj bone pripensis kaj certigis al si pri tio,  
Ke iuj estas maturaj, aliaj estas nematuraj.  
Poste la Budhoj predikis provizore tri veturilojn  
En la vojo de Unu Veturilo.

---

<sup>10</sup> Veraj ŝravakoj, 真の声聞. Jen estas du specoj de ŝravakoj. Unuj vekiĝas aŭdinte voĉon de la Budho. Aliaj predikas per sia voĉo. Ĉi tie estas la lasta ŝravako apartenanta al Mahajano.

<sup>11</sup> goŝirŝa ĉandano, incensa arbo, kiesodoro estas simila al mosko. Ĉi tiu arbo multe kreskas sur la monto Malaja en Hindujo.